

Nikolaus Lenau,  
La postiljono

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ĉarma estis nokt' de Maj',  
nuboj de arĝento  
flugis ĉe l' ĉielo kaj<sup>2</sup>  
blovis varma vento.

Ekdorminte kuŝis nun  
voj' kaj strato ĉiu;  
noktogardis nur la lun'  
kaj krom ĝi neniu.

Kaj trankvile tra l' kampar'  
iris la aero,  
kie dormis la idar'  
de la primavero.

Nur la rivereto sen  
bruo fluis tie,  
kaj odoris floroj jen,  
sonĝe idilie.

Postiljono krudis pli,  
vipon li knaligis,  
lian kornon laŭte li  
tra la val' sonigis.

...

---

<sup>2</sup>aŭ: flugis surĉiele kaj

Sonis de l' ĉevaloj kvar,  
dum la veturado,  
tra floranta la kampar'  
gaja huffrapado.

Preterflugis la pejzaĝ',  
kiam ni rapidis,  
ke la pacon de l' vilaĝ'  
mi apenau vidis.

Preterrapidante mi  
vidis che preĝejo,  
ke en maj-feliĉo ĉi  
kushis jen tombejo.

Staris alte super ni,  
ĉe dekliva vojo,  
pala kruco-bild' de Di',  
mute en malĝojo.

Kaj la postiljon' malpli  
gaja nun fariĝis,  
la ĉevalojn igis li  
halti kaj mutiĝis.

„Halti devas tie ĉi  
ja ĉeval' kaj rado;  
ĉar jen kuŝas“, diris li,  
„mia kamarado.

...

Estas tre domaĝe, ke  
kuŝas li entere.  
Estis li ja kara tre,  
ho sinjoro, vere!

Devas halti ĉiam mi  
en ĉi tiu loko,  
lin saluti tie ĉi  
frate per korn-voko!“

Gajan kanton sendis li  
per la korn-blovado,  
por ke trapenetru ĝi  
al la kamarado.

Kvazaŭ respondado de  
jena kamarado  
sonis de la monto re  
lia korn-blovado. -

Lante pluveturis ni,  
kaj blovado lia,  
longe postsonoris ghi  
en orelo mia.

*Traduko de la Germana poemo “Der Postillon” de NIKOLAUS LENAŬ (\*1802-08.13 – †1850-08-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1984.*

*MR154-2 / Arg-625-1264 (2014-08-27 13:27:24)*